



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L
(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1992 — 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... amerikaj pejzagôj en Francio...



... Kaj diablo Paganini

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
Eksterlando en Francio	3
Mistera K. Kolombo: fino (F. Boyet)	4-6
Diabla Paganini (S. Boniol)	7-9
Ĉu naski provtube? fantazio	10
Konfeso de la Martiginto (Jankov)	11-13
Por via Distro (R. Gonin)	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

La legado de la oktobra komitat-kunveno (p.15) donos al vi ne nur raporton pri la vivo de la Kultur-Domo en 1992, sed ankaŭ la kalendaron kaj la programon de la aktivaĵoj por la jaro 1993. La sukceso de la Internacia Infanrenkonto en 1992 kuraĝigis la komitaton peti Paulette Naulet zorgi denove pri simila aranĝo en 1993. La verŝajna partopreno de kelkaj hungaraj geknaboj estas jam antaŭvidita. Instruistoj el aliaj landoj ŝatus veni kun grupoj da lernantoj. Nura bremsa, sed grava: la financa subteno. La vojaĝelspezoj estas grandaj, kiam grupo venas el iom malproksima lando. Multaj kandidatoj hezitas. En 1992, dank'al diversaj monhelpoj estis eble balanci la buĝeton. Ni esperas, ke, en 1993, denove ni ricevos mondonacojn ne nur

de organizoj (lastjare GEE multe helpis), sed ankaŭ de unuopuloj. Ni jam enkasigis sumojn donacitajn de kelkaj geamikoj. Ni esperas ke ankaŭ multaj aliaj sendos eĉ sumetojn. Gravas, ke geknaboj el diversaj landoj konatiĝu en etoso amikeca dum programo en kiu ekvilibriĝas laboro kaj distro. Tiaj spertoj travivitaj de geknaboj neniam forviŝiĝas el iliaj memoroj. Helpu nin, helpu ilin; sendu vian ĉekon al la esperanto-Domo por "Infan-Renkonto"

NI FUNEBRAS

Roland Levreaud mortis. Ni sciis jam de longe, ke li suferis tiel nomatan "longan malsanon", sed li tiel serene, tiel kuraĝe frontis la malsanon! Li ne volis malesperi. Li multe laboris por Esperanto, sine de SAT-Amikaro kaj de FEL, kies prezidanto li estis dum kelkaj jaroj. Lia nomo ne brilis ĉe la ĝusta supra loko ĉar tion li ne volis. Pli gravis al li senbrua, senŝanceliĝa iro survoje al elektita celo, ol gloro. Ĉiuj liaj amikoj amis kaj respektis lin.

Esperanto tra la Mondo



KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ ESTINTAJ...;

La 65-a SAT-Kongreso okazis en Litovio. Preskaŭ 500 partoprenantoj renkontiĝis en Kaunas, en la Agrikultura Akademio, de la 4-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1992. Prelegoj kaj diskutoj temis pri ekonomio, ekologio, etnismo, E-teatro kaj lingvaj problemoj en Eŭropo.

Cento da gejunuloj ariĝis en Montreal por la Junulara Internacia Kongreso.

La 26-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Edukistoj (ILEI) kunvenigis 112 partoprenantojn el 23 landoj, en Bratislava (Slovakio). La esenca parto de tiu konferenco estis la gimnazio, internacia semajno por 13-16 jaraĝaj geknaboj (18 el 8 landoj).

La unua Mondkongreso de la esperantistoj-handikapuloj okazis en la banloko Františkovy Lázně (Ĉeĥoslovakio) kun 69 homoj el 8 landoj.

La ĉina urbo Qingdao akceptis 856 partoprenantojn, de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto por la 5-a Pacifika Esperanto-Kongreso. La rezolucio alvokas al starigo de kunordiga centro por la esperantistoj de la pacifika regiono, kiu eble naskiĝos dum la universala kongreso en Seulo, en 1994.

...KAJ ESTONTAJ- La Universala Kongreso de UEA okazos en Valencio (Hispanio) de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1993.

La 66-a kongreso de SAT okazos en la Valo de la Rozoj en Bulgario, en la urbo Kazanlak de la 14-a ĝis la 21-a de aŭgusto 1993.

La Junulara Kongreso okazos en Vraca (Bulgario) de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto.

Esperanto-Ligo de Israelo kaj Kooperativo de Literatura Foiro invitas al la 3-a Mediteranea Konferenco de Esperantologio, en Tel-Avivo, la 13-an kaj 14-an de aŭgusto 1993, pri la temo: "Zamenhofologio: esploroj kaj kontribuoj". Informas: LF-Koop, CP 232, CH-6830 Chisso 1 (Svisio).

La franca kongreso de Franca Esperanto-Unuiĝo (UFE) okazos en Pau de la 7-a ĝis la 11-a de majo.

La kongreso de SAT-Amikaro okazos en Herouville-Saint-Clair, apud Caen, de la 9-a ĝis la 13-a de aprilo 1993.

TUTMONDA KONFERENCO "POR LA TERO"-

Dum la UN-Konferenco pri Medio kaj Evoluigo, kiu okazis en Rio-de-Janeiro, pli ol 30 esperantistoj deĵoris en tri standoj de la Globa Forumo, farante informlaboron en 10 lingvoj. En la Forumo de la NRO-oj (neregistaraj organizaĵoj) okazis 17 prelegoj pri "Esperanto kaj Ekologio" kaj oportunaj alparoloj pri internacia interkompreniĝo estis faritaj en multaj aliaj debatoj. Fine, punkto favora al la disvastigo de esperanto estis inkludigita en la "Etika kompromiso de la NRO-oj por tutmonda sinteno kaj konduto". Antaŭ la forumo la esperantistoj sukcese informlaboris en la unua Mondkongreso de la Verdpartianoj (30-31-an de majo).

RENASKIĜO DE ESPERANTO EN ALBANIO-

La franclingva "Nouveau Cours d'Esperanto" d'Edmond Ludwig kaj Renée Triolle estis tradukita en albanan lingvon kaj estas preta por presado. Esperanta-albana vortaro estas ankaŭ preparata. Jam aperis en tiu lando esperanta traduko de la libro de Kristo Frasherî pri "Gjergj Kastrioti Skandereberg, nacia heroo" kaj poemaro "Spektro" de 15-jara albana esperantistino.

GRAVEDAJ ESPERANTISTINOJ SERĈATAJ-

Se vi atendas infanon kaj se vi jam decidis instrui al ĝi esperanton denaske, vi interesas S-ron Renato Corsetti, kiu preparas sciencan esploron pri la temo. Rilatu kun li: Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00036 Palestrina, Italio.

EKSTERLANDO EN FRANCIO

En Alta Provenco larĝe malfermiĝas la baseno de Apt, pli verdeca kaj samtempe pli severa ol la cetero de la provinco. Ĝi estas la favora tereno de la blanka kverko kaj ankaŭ de la bukso, de la timiano kaj de la satureo, kiuj invadis la ne plu kultivitajn kampojn. Du monto-ĉenoj baras la horizonton: sude, la malhela norda flanko de Luberon; norde la spino de monto Ventoux kaj de la Lure-montoj, vintre neĝkovritaj.

Tie troviĝas la franca "Kolorado", inter la urbetoj Rustrel kaj Gignac. Unika pejzaĝo kaj vera kolor-simfonio. Mediteraneaj pinoj verdkoloro makulas teron, kiu hezitas inter sabla flavo kaj ruĝo. Tero, kiu gloriis en 1877, kiam ekfunkciis la unua vagonaro. En tiu epoko vera "kurego al okro" okazis, kiuj postlasis spurojn. Oni povas vidi nenion kompareblan kun la forlasitaj minejoj kaj fantomaj urboj en Usono sed la malnovaj galerioj de Gargas, nun uzataj por fungo-kultivado, nutras la imag-povon. La Doua, rivereto, kies akvoj estas tre koloritaj, estas kvazaŭ juna kvieta frato de la usona rivereto.

Kelkajn kilometrojn for de la franca Kolorado troviĝas la vilaĝo Oppedette kaj ĝiaj tre konataj faŭkoj. Promenado laŭlonge de la rivereto Calavon ĝis la fundo de la faŭko estas ege bela, sed danĝera kiam la vetero estas fulmo-tondra, ĉar la nivelo de la fluanta akvo tre rapide altiĝas.

Ankaŭ ege pitoreska estas la franca "Granda Kanjono". Ĝi troviĝas iom pli oriente, kie fluas la rivero Verdon. Nur en 1905 Edouard Martel, patro de speologio malkovris tiun faŭkegon 700-metrojn profundan en kelkaj lokoj, inter sovaĝaj klifoj. Veturado laŭ unu aŭ la alia flanko prezentas spektindajn aspektojn, ĉefe kiam oni haltas ĉe iu el la multaj belvidejoj. Eblas esplori la bordojn mem de la rivero atentante pri la vetero,

ĉar ankaŭ ĉi tie la fulmotondroj altigas la nivelon de la akvo tutsubite. Tiea piedirado ebligas la malkovron de fantastaj spektakloj. Ankoraŭ pli mirinda estas veturado sur la rivero per kanuoj.

Ni transiru al la Atlantika marbordo ĝis la regiono Landes, kie troviĝas lokoj similaj je la usona ŝtato Luizjano. La lageto Leon kaj la rivereto Huchet ebligas iom ekzotikajn boat-veturadojn. Post transirado de la lageto, ne tre profunda, bordata de kanoj kaj pinoj, tre fiŝriĉa, la ŝanelo, kiu ligas la lageton kun la oceano estas belaga, ĉar ĝi fluas tra ekzotika vegetaĵaro plantita de la homoj. Tie kreskas, unu apud la alia, pinoj, kverkoj, kanoj, arumoj, hibiskoj, nimfeoj, kalvaj cipresoj, gigantaj filikoj kaj tamarikoj. Tiu sukoriĉeco speguliĝas en verdaj kaj oranĝ-koloraj akvoj de kvieta rivereto, kiu fluas tra vera arbar-galerio el akvo-amantaj specioj. Tra la amfibia verdaĵo oni ekvidas la grandan arbaron de Landes kaj malgrandajn senarbejojn kun maloftaj domoj ĉirkaŭitaj de ĝardenetoj aŭ malgrandegaj vitejoj. Vera vojaĝo tra la Luizjanaj "bayous".

De Luizjano, suden, ni trairas la ŝtaton Teksas kaj alvenas en Meksikon. En Francio, de la Atlantika Oceano, orienten, ĝis la Alpoj ni atingas "meksikiecan" valon, norde de Provenco kaj sude de Daŭfenlando. Tiu valo estas la Ubaye valo. Tie, kvankam la lumo estas mediteranea, la pejzaĝoj estas severaj, eĉ dezertaj, inter montoj, kiuj kulminas ĝis 3000 metroj. De tiu ne tre gastama regiono, en 1821, la tri fratoj Arnaud elmigris al Meksiko serĉante bonŝancon en teksindustrio. Ilin sekvis multaj kamparanoj; oni citas la nombron 5000. Ek de 1860, riĉiĝintaj, la pli multo revenis "hejmen" kaj tie konstruigis, laŭ la meksika stilo, luksegajn domojn kaj monumentajn tombojn. Tiuj atestoj de la meksika epoko estas videblaj en Jausiers kaj Barcelonnette.

LA MISTERA

KRISTOFORO

KOLOMBO

(FINO)

KOLOMBO SUR LA INSULOJ - Ĉiuj scias, ke Kolombo ne estis bona kolonianto. Sed kial? Fakte la opinioj de Kolombo rilate al la indianoj kaj ankaŭ rilate al la hispanaj koloniantoj multe variis inter 1492 kaj 1500.

En San Salvador, li miris pri ĉio kaj multe laŭdis pri la naturo: "Vidi tiom da belaj verdaĵoj tiel malsimilaj de la niaj"... "vegetaĵoj tiel abunda kaj freŝa, kiel en la maja monato en Andaluzio". Pri la homoj, Kolombo priskribas ilin kiel belaj kaj tre afablaj, sed li ankaŭ skribas: "la enloĝantoj faros ĉion, kion oni petos de ili... Oni vidas, ke ili estas kapablaj labori laŭ ordonoj: semi kaj fari ĉion, kion oni juĝos utila. Ili povos konstrui urbojn kaj sin vesti kaj konduti same kiel ni". El tiu unua juĝo, tipe kolonia, li taksas la indianojn, kiel infanojn, kiujn oni devas eduki laŭ nia Eŭropa kulturo.

En Hispanjola, kie oni fakte establis kolonion, la problemoj estis malsama. Unue Kolombo antaŭvidis respekton rilate al la indianoj. Li ordonis al la hispanoj: "neniel malrespekti la indianojn, kaj nenion preni de ili kontraŭ ilia volo". Li mem resendis virinon respekteme, sed la aliaj maristoj ne agis same. Sed kiam li foriris al Hispanio, en decembro 1492, li lasis fortikaĵon por la 39 koloniantoj, kiuj restis sur la insulo. Kial fortikaĵo, se oni vivas tute pace kun la indianoj?

Post la vojaĝo al la insuloj de la kariboj, Kolombo provas zorge distingi la "bonajn" indianojn (de la grandaj antilioj) kaj la aliajn, kiuj estas "krueblaj homoj, kiuj manĝas homan karnon". Sed surloke, neniu zorgas pri tiu distingo kaj ĉiuj indianoj estas rigardataj, kiel sklavoj, speciale, kiam ili deziras respekti sian religion, kiun ili miksas kun la kristana.

En 1498, kiam Kolombo revenas de sia vojaĝo al la malgrandaj Antilioj, li trovas en la kolonio Hispanjola veran militon inter la koloniantoj. Francisko Roldan kun 70 koloniantoj ribelis kontraŭ Bartolomeo Kolombo, kaj la indianoj profitis de la milito inter hispanoj por siavice ribeli. Kristoforo hezitas inter indulgo kaj punoj. Kiam, la 23-an de aŭgusto 1500, alvenas la sendito de la reĝoj, li vidas hispanajn nobelojn pendumitajn. Tiam, tiu sendito Bobadilla, arestas la familion Kolombo. Kristoforo tute malsukcesis en la administrado. Li konsciis pri tio, kiam li petis de la reĝoj: "kelkajn piajn religiulojn pli ĝuste por reformi la fidon de la kristanoj ol por ĝin porti al la indianoj". Poste, kiam li elvokas tiun vivon li skribas: "Pri Hispanjola, Paria kaj aliaj teroj, mi ne povas pensi ne plorante. Ili estas vizaĝaltere, kaj kvankam ili ne mortas, la malsano estas nekuracebla. Por detrui, ĉiu estas mastro".

KOLOMBO KAJ LA REĜOJ DE HISPANIO-

Ekde la komenco, Kolombo pli sukcesis apud Izabela, al kiu li promesis novajn kristanojn, ol apud Ferdinando, al kiu li promesis oron. Post la sukceso de 1492, la rilatoj inter Kolombo kaj Ferdinando restis malbonaj, kaj la reĝo nomis iun ministron por kontroli la agadon de la "admiralo". Sed la raporto de Kolombo al la reĝo estis same kontraŭaj inter si kiel estis lia konduto en la kolonio.

Unue Kolombo sendis raporton pri la mirinda lando, kie li elŝipiĝis (San Salvador), sed tio ne estis la Indioj, kaj ne estis oro. Estas nur homoj afablaj, kiuj povas utile labori por la konkerantoj.

La ŝiprompo de la "Gallega" okazis la 24-an de decembro 1492 en ne klaraj kondiĉoj. Oni asertis, ke la ŝipo frapis kontraŭ sablamason, ĉar ĝi estis tiam direktita de sensperta junulo. Tio estas stranga. Due oni rimarkis, ke tiuj kristanoj, kiuj intencis instrui

la kristanan religion al la indi~~ano~~^{anoj}, nenion preparis por la Kristnaska festo. Tio, tiu ŝippereo devigis lasi 39 homojn en Hispanjola dum la revena vojaĝo de Kolombo al Hispanio. Iu usona historiistino asertas, ke inter la 39 homoj, kiuj restis, la pli multo ne estis enskribitaj por la unua vojaĝo. Tio montras, ke Kolombo prenis kun si, kaŝe de la reĝoj, homojn, kiuj deziris fuĝi el Hispanio. Oni ne forgesu, ke 1492 estas la jaro, kiam la katolikaj reĝoj forpelis de Hispanio kaj la judojn kaj la maŭrojn. La ĉefoj de tiuj unuaj koloniantoj estas Diego de Arana, kuzo de la kromedzino de Kolombo, Rodrigo de Eskovedo, notario de la ekspedicio, nevo de unu el la amikoj de Kolombo en la monakejo de La Rabida, kaj Pedro Gutierrez, oficiro de la ĉambro de la reĝo kaj ŝildisto de la granda Intendanto. Almenaŭ du inter ili estas konvertitaj judoj. Konklude kaj paradokse: la unuaj koloniantoj de la nova mondo estis judoj forpelitaj de la katolikaj reĝoj. Kaj samtempe Kolombo provis kontentigi Izabelan dirante: "La celo kaj la principo de tiu entrepreno estis la disvastigo kaj la gloro de la kristana religio kaj la akcepto, en tiuj regionoj, nur de bonaj kristanoj". El tiu ambigueco kaj tia paradokso naskiĝis la hibrida sudamerika eklezio sub la patronado de Hispana kaj Ĝenova homo, eble judo, kiu poste revos pri universala kristanaro, kiu akceptus ĉiujn religiojn.

La komerco de la sklavo-

La 30-an de januaro 1494, Kolombo sendas sklavojn al la reĝoj kun tiu klarigo: "Por la bono de tiuj kanibalaj animoj kaj ankaŭ de la ĉi tieaj enloĝantoj, venis en nian spiriton la ideo laŭ kiu ju pli malproksimen oni sendos ilin des pli bone estos, kaj pri tio, viaj princaj moŝtoj povos esti servitaj". La ideo de Kolombo estas pagi la transportistojn, kiuj liveras materialon al Hispanjola per "kanibalaj sklavo, homoj kruelaj sed fortikaj, kiuj bone komprenas, kiuj eltiritaj el sia malhomeco fariĝos la plej

bonaj sklavo, kaj perdos sian malbonan kutimon". Sed Izabela dubas pri la kristana valoro de sklavigo. Oni nomas komisionon de teologoj por juĝi, ĉu sklavigo laŭ la maniero de Kolombo estas kontraŭa al la Biblio aŭ ne. La teologoj respondas, ke sklavigo kontraŭas la Biblion, kaj Izabela, kiu estis ricevinta donace de Kolombo ducent sklavojn, liberigas ilin kaj resendas ilin al Hispanjola.

Ferdinando kontroligas la laboron de Kolombo- Kiam Kolombo ekiris en 1492, li estis ricevinta pompajn titolojn. Sed Ferdinando, kiu neniam amis Kolombon, decidis, post la fondado de la kolonio, la kreadon de ministerio, kiun li konfidis al Juan Rodriguez de Fonseka, episkopo de Badaĥozo. En oktobro 1495, Ferdinand kaj Fonseka sendas inspektoron al Hispanjola, Juan Agado. En 1500, post la ribelo de 1498 kaj la punhaltigo fare de Kolombo, la reĝo sendas novan guberniestron al la kolonio, Bobadilla, kiu arestos Kolombon la 23-an de aŭgusto. Sed la 17-an de decembro Kolombo estas akceptita de la hispanaj reĝoj en Granado. Kolombo vojaĝos ankoraŭ en 1502, sed tiam li ne plu estos la mastro; li ne ricevas la permeson elŝipiĝi en San Domingo...la rilatoj kun la reĝoj estas finitaj.

LA REVOJ DE KOLOMBO- Kolombo estis profesie maristo kaj komercisto. Li bone montris tion per la sukceso de siaj petoj al la hispanaj reĝoj kaj per la sukceso de siaj vojaĝoj. Sed la homo Kolombo havis hobion: li volis malkovri la mondon ĝenerale kaj teran paradizon speciale. Tial li interesiĝis pri la vojaĝoj kaj la geografio. Tial li legis multajn librojn, kie estis eraroj, kiuj paradokse helpis lin en lia serĉo. Pro konfuzo inter la arabaj mejloj kaj la maristaj mejloj, li grave eraris pri la daŭro de la vojaĝo al la Indioj. Foje la eraroj estis en la libroj, kiujn li legis, ekzemple la "Imago Mundi" de Pierre d'Ailly, sed la meminstruito Kolombo ne povis kritiki siajn kredojn, kiel faris la spertuloj dungitaj de

la reĝo de Portugalio.

Kolombo ne estis sciencisto, kiu kapablas kritiki siajn hipotezojn; li estis fidulo, kiu kredas, ĉar li deziras kredi. Judo aŭ ne, li havis judan kulturon, kiu nutris tiun kredemon. Kiam li provis agi favore al sia projekto, li uzis ĉiajn argumentojn, laŭ komercista maniero. Kiam li navigis meze de danĝeroj, li tre simple mensogis al siaj maristoj pri la distancoj, kaj poste al la indianoj pri la luna eklipso; li eĉ trudis mensogon al sia tuta maristaro, pri la malkovro de Indioj en 1494. Por konservi la helpon de la reĝoj, li provis kontentigi ilin per kristanigo aŭ alporto de riĉaĵoj, eĉ kiam tiuj du celoj konfliktas, kiel okazis kun la donaco de sklavoj.

Sed kiam li estas sola, kiam li skribas notojn marĝene de la legitaj libroj, kaj kiam li redaktas la "libron de la profetaĵoj", tiam Kolombo montras sian veran opinion. Li revas pri ununura religio, kie la kristanoj, la judoj kaj la maŭroj estus fratoj, sur tero, kie estas tera paradizo, laŭ la komuna libro al tiuj tri religioj: la Biblio.

La posteuloj de Kolombo— La misteroj multas en la vivo de Kolombo, la lasta rilatas al lia tombo. Ekzistas du tomboj de Kristoforo: iu estas en Seviljo, en la katedralo, kaj la dua estas en San Domingo. Kie estas la korpo? Eble en neniu el tiuj du. Li mortis en Valladolid, sed la familio vivis en San Domingo ĝis 1580. Poste ili revenis al Hispanio.

Okazis proceso inter la reĝo kaj la familio de Kolombo pri la titoloj, inter kiuj kelkaj entenis profiton. Tiu unua proceso daŭris inter 1506 kaj 1536. Sed poste estis aliaj procesoj inter diversaj personoj de la familio, por scii, kiu estas la vera heredanto. Tiuj internaj procesoj daŭris ĝis 1793! La laŭleĝaj heredantoj ankoraŭ nun ekzistas. En 1986 la admiralo Kristoforo Kolombo estis mortigita de la teroristoj de vaska partio. De tiam, la filo heredis de la titolo, duko de Varagua, Admiralo de la oceana maro, kaj vicreĝo de la Indioj. Krom tiuj honorigaj titoloj, la mortigito de 1986, amiko de la reĝo Juan Karlos, estis admiralo, direktoro de la Instituto de ŝipa historio kaj ŝtabano de la hispana militŝiparo.

(PRELEGO FARITA DE F. BOYET EN GRESILLON)

DANKEME

Pascale Babin kaj Pierre(Alexis estis kortuŝitaj de la multaj feliĉo-deziroj kiujn ili ricevis. Ili elkore dankas ĉiujn, kiuj partoprenis en ilia ĝojo.



KULTURAJ KAJEROJ
deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn
tagojn dum la venonta jaro.

DIABLA PAGANINI

"Verdire per la mano min kondukis la diablo", Paganini skribis al Heinrich Heine.

Nicolo naskiĝas la 27-an de oktobro 1782 en Ĝenovo. La familio loĝas sur ŝtuparforma strateto, la tiel nomata "trakonduko de la nigra katiĉo", proksime al la domo de Kristoforo Kolombo. La patro, havena enkestigisto, kanzonludas per mandolino. La malforta pala knabeto kun brilaj okuloj kaj nigraj harbukloj frue fervoras pri muziko, ĝuas la patran mandolinon kaj katedralan orgenon. Li ekstudas dank'al la violoneto de la frato.

Unu nokton la revema superstiĉa patrino sonĝas (ni ne forgesu, ke tiutempe famas Gaetano Pugnani, kiu sin titolas "la Cezaro de la violono"; Pugnani, disĉiplo de Tartini, kiu siavice skribis mirindan sonaton sub diktado de la diablo - tiel la legendo raportas). La patrino, do, kies plej arda deziro estas, ke la filo fariĝu unuaranga muzikisto, jene sonĝas: en vasta malluma teatro iu mirinde violonludas. Antaŭ li en la orkestroŝakto lumbrila anĝelo batas la takton. Malantaŭ la solisto staras malbelaĉulo malgrasa, nigra, lama, kun gitaro enmane; li estas ruĝe vestita kun surkapaj kornoj. Tio estas la diablo. Ĝi deziregas sukceson por la filo: tion la anĝelo promesas. Fakte dum la tuta vivo la virtuozo submetiĝos al duobla, tamen kontraŭa, influo de la gard-anĝelo kaj de spiritaĉo. Tial legeblas en Lepsika gazeto: "Li tiel diableske ekaperas, ke oni tuj serĉas, ĵen la fenditan hufon de Satano, ĵen la flugilojn de anĝelo." Sed, por romantika artisto, aspekti laŭ la ĉirkonstancoj sub la trajtoj, ĉu de demono, ĉu de anĝelo, ĵen bona afero!

8-jaraĝa li alfrontas la ĝenovan publikon; tri jarojn poste li ludas en la urba teatro. Kune kun la patro li trakuras la tutan Italion dum studvojaĝo. Li komponas siajn unuajn etudojn, kies malfacilaĵojn li supervenkas po 10 horoj tage.

Je la aĝo 17 jarojn li forliberiĝas, vetludas kaj diboĉas. Okaze de hazardludo li forperdas la violonon. Riĉa amatoro, posedanto de Guarnerius-muzikilo lin tiklas per la ĉi-sekva propono: se li scipovos deĉifri malfacilan konĉerton li ricevos la mirindan violonon. La junulo provas, kompreneble sukcesas kaj havigas al si la mirindaĵon.

Ne kontestebblas, ke antaŭ Paganini multenombraj violonistoj famis (ni menciuj la nomojn de Corelli, Locatelli, Nardini, Tartini, Pugnani, Kreutzer, Stamitz). Sed empirie estis violonludate. Dank'al Paganini estos por ĉiam difinitaj la principoj de tekniko, kiu ne plu progresos. Kion plenumis Liszt por la fortepiano per siaj "transcendaj etudoj", tion plenumis Paganini por la violono. 19-jaraĝa li resumas siajn eltrovaĵojn en 24 kapriĉoj, vera brevierio por ĉiuj posteuloj. Li scipovas ludi sur tri kordoj, se la kvara rompiĝis. La arĉon li ĵetas sur la kordon kaj trakuras gamoserion en fulma rapideco. Foje eĉ ŝajnas al la aŭskultanto, ke du violonojn li samtempe aŭdas.

Ne tre ampleksa estas la sonoro de Paganini, sed vibra, kiel homovoĉo. Kulminas la entuziasmo de la publiko, kiam li ludas sian sonaton "Napoleono" per la nura kvara kordo. Tiam impreson eĉ naskas la korpoaspekto: nekredebla malgraseco, tur-aspekta frunto, brilaj okuloj, profunde enigitaj en la okulkavoj, senkarnaj fingroj, kiel la ungegoj de diablo. 5 futojn kaj 5 colojn li altas. Du survangaj profundaj sulkoj pensigas pri la duobla "S" de la violonsupro.

Senemocia estas la vizaĝo, dum li ludas. Tamen sur ĝin aplaŭdondro naskas ian rideton... Nenia bonkoreco en la rigardo.

Dum li estas batalanta kontraŭ teknikaj insidoj lia korpo formas iaspecan triangulon: ĝi nekredeble fleksiĝas, dum la kapo kaj dekstra piedo antaŭeniĝas. Li povus aspekti la ĉefrolulo en ekstravaganca novelo.. Kiam li staras, la dekstra brako ŝajnas pli longa ol la maldekstra. Eksterordinara la fleksebleco de la ŝultraj, manradikaj kaj manaj

ligamentoj; eksterordinare flekseblaj ankaŭ la maldekstramanaj fingroj. Aparte akras la aŭdpovo: kion oni flustras eĉ de malproksime, tion li aŭdas. Vere doloras al li, kiam oni laŭtparolas apude. Meze de senbridita orkestro li agordas la violonon per apenaŭa fingro-palpetado.

Pri si mem li diras jene: "Bela mi ne estas, sed kiam ili min aŭdas, la virinoj rampas je miaj piedoj." Pro tio, oftaj kaj nedaŭraj amaventuroj. Lin favoras Eliza, fratino de Napoleono. Iun tagon li improvizas sonaton sub la titolo "amosceno". Depreninte la du mezajn kordojn li uzas la akutan (E-kordon) por kantigi Venuson kaj la kvaran (G-kordon) por la voĉo de l'amato.

En 1824 li edziĝas sed post kvar tagoj forlasas la edzinon, kiu tamen naskos la filon Aŭilo. Muzikrecenzisto admonas siajn legantojn: "Ĉion vendu, ĉion garantidonu por ajnakoste aŭdi la superhomon." Kaj alia konsilas, ke ĉiuj nov-akuŝintinoj kunprenu la suĉinfanon por aŭskulti koncerton de Paganini, por ke je la aĝo 60 jarojn li povu fieri pro tio, ke lin li iam aŭdis. Liszt rimarkas: "Kia homo! Kia violono! Kia artisto! Dio! Kiom da sufero, kiom da mizero, kiom da turmento sur liaj kvar kordoj!" Schubert: "Mi aŭdis anĝelon kanti". Chopin: "La ludmaniero de Paganini estas neklarigebla laŭ la nuraj homofortoj." Kaj asertas Rossini: "Nur tri fojojn mi ploris dum mia vivo: la unuan fojon kiam mia unua operdrama fiaskis; la duan, dum ŝippromeno, kiam trufita meleagrino falis en la akvon; la trian dum Paganini violonludis." Kaj sin demandas Goethe: "El kie venis al li tia talento laŭ la homoleĝoj neklarigebla? el Dio? El la diablo? Mi nescias."

Paganini siaflanke aludas "magian farmanieron", kiun li rifuzas diskonigi. "Kiam mia sekreto estos konata, la artistoj sukcesos pli profunde pristudi la naturon de violono, cent fojojn pli riĉa muzikilo ol kion oni kutimas kredi." Lia

metodo fakte konsistas el "konstanta trejniĝado po 5-6 horojn tage".

Egajn sumojn li enpoŝigas, kio plifirmigas lian legendon. Ĉe ĉiu montrofenestro aperas lia refiguraĵo subforme de biskvitoj, ĉokolado, bombonoj, medaloj, pantalonej, ĉapeloj. Sur la pluvombreloj lianomaj ŝaf-intestoj anstataŭas la kutimajn ripojn kaj arĉo la tenilon. En 1836 gantoj laŭ la Paganini-maniero tiom furoras en Parizo, ke vendistino, ne rekoninte la artiston, proponas al li tiajn. "Nu, li rebatas, ĉu vi ne havus specimenon el alia besto?"

Li vojaĝas kun Aŭilo. Li



NICOLÒ PAGANINI (1781-1840), VIOLONISTO.

montriĝas, jen malmolkora avarulo, jen mondonema, interalie al Berlioz, al kiu li oferdonas 20.000 orajn frankojn, ĉar lian genion li admiras kaj lian mizeron li priploras.

Dum la printempo 1840 lin trafas laringa tuberkulozo, kiu senigas lin je parolpovo. Jen la kuracista diagnozo: "Animo fajra, helpata de violono; li jam estas nura ombro, en kulmino de elĉerpiteco." Paganini petas, ke cent diservojn oni celebru por la kvietiĝo de lia animo, kiun li volas fordoni al la senlima indulgo de la Kreinto. Li nescias, ke pasos 36 jaroj antaŭ

ol li rajtos ripozi sub benita grundo.


La episkopo de la Nica Graflando malpermesas, ke oni transportu la korpon al Ĝenovo, eĉ pli: ke ĝi ricevu kristanan entombigon. Kial? Ĉar de la tempo, kiam li enloĝiĝis en la urbon Nico li neniam konsentis monoferi al la almozmanoj al li senditaj. Krome, en la domo de la mortinto okazis strangaj fenomenoj: muzikfrazoj eliĝas el la muroj, sonas paŝoj kvazaŭ de peze ŝarĝita homo. Du-tri noktojn la episkopo travivas tie. Timskuate li revenas al la episkopejo kaj certas pri tio, ke ja hantita estas la domo.

Dum kvar jaroj oni kaŝas la kadavron, kiu interalie kuŝas je la fino de Ferrat-kabo. En Nico la jezuitoj senbridiĝas...Laŭ onidiroj la restaĵoj estas transportataj en anfrakton sur izolita insuleto. La loko nomiĝas "la truo de Paganini" kaj la legendon pri tiu "truo" aŭtentos Guy de Maupassant en unu el siaj romanverkoj.

Fakte Paganini kuŝas en flankajo de la lazareto en Villefranche ĝis la 17-a de aprilo 1844. Tiam la ĉerko estas enmetita en kestegon kun la surskribo "komisariato pri la sanservoj" kaj diskrete lokita en modestan familidomon apud Ĝenovo. Pli poste li estos denove translokita en luksan vilaon, iaman posedaĵon.

La eklezia proceso daŭros pli ol 30 jarojn. Finfine, en 1876, okazas la revizia juĝado. De tiu tempo la estinta virtuozo rajtas ripozi en la tombejo de Parmo, la urbo de la violoj, sub ombro de la kruco de Kristo, inter cipresoj kaj olivarboj.

Simone BONIOL



Laste aperis

(vidu ankaŭ p. 16)

Finfine, oni anoncas la aperon de la granda vortaro franca-esperanta al kiu sopiris de longe la franc-lingvaj esperantistoj. Ĝi estas preskaŭ 1 000 paĝa kaj pritraktas 32 000 francajn vortojn. La ĉefredaktoroj estas Jak Le Puil kaj Jean-Pierre Danvy. La eldonanto estas U.F.E. La anoncita vendo-prezo estas 250 ff. + sendokostoj.

"Angoroj" de Jacques-Louis Mahé, unua filmo originale farita en esperanto, laŭ la 16-milimetra blanke-nigra bazo, aperis, kiel vidbendo. Ĝi estas havebla ankaŭ ĉe la Libro-Servo de Grésillon.

La "Fundamenta Krestomatio" estas reeldonita kun notoj de Pr. Waringhien. temas pri la senŝanĝa teksto verkita de Zamenhof en 1903. Baza libro por niaj bibliotekoj.

"Kara Amiko" estas esperantlingva bulteno eldonita de la "Kastora Klubo", kiu konvenas por junaj partoprenantoj de kurso. Petu ekzempleron, aldonante internacian respond-kuponon, skribante al: Kastota Klubo, ul. Putawska 3-11, 02-515 Warszawa, Pollando.

"Moderna historio de Ĉinio laŭ temoj", eldonaĵo el Pekino pri la historio de Ĉinio ekde 1840.

"Sonĝe vagi", noveloj de la bulgara aŭtoro esperantista Julian Modest (Georgi Miĥalkov).

"Urd Hadda murdita!" nova detektiv-romano verkita de la konata Deck Dorval.

"Ek al leg'" el Bulgario. Du volumoj, kiuj celas "provoki la esperantistojn eklegi".

ĈU

NASKI PROVTUBE?

Komuna verkado de staĝanoj en Sète

- Ĉu vi memoras tiun anonceton, Andreo?
- Ne. Pri kio temas?
- Legu mem. Mi retrovis ĝin en malnova numero de "Scienca Revuo".
- Marko prenas la revuon kaj laŭvoĉe legas: "Nobel-premiito 45-jara, proponas sian semon al ĉirkaŭ 25-jara, bela, blonda, bluokula, intelektu elstara doktorino pri interlingvistiko, cele al provtuba kreado de mense superdotita homo. Sin turni al la revuo, kiu peros".
- Kial vi reparolas pri tiu afero?
- Ĉar ĝuste la laboratorio, kie mi dungiĝis antaŭ kelkaj semajnoj, ludis gravan rolon en tiu afero.
- Ĉar ne temis pri ŝerco?
- Ne; Vi scias, ke tiu laboratorio interesiĝas pri genetiko. Antaŭ pluraj jaroj ĝi planis eksperimenton pri kreado de superhomo. Tiucele ĝi kontaktis plurajn eminentajn sciencistojn en la mondo. Unu el ili favore respondis, iu, ni diru, Paul Igloto.
- Ĉu li mem ne havis infanojn?
- Li havis kvar, ne sufiĉe inteligentaj laŭ lia takso.
- Ĉu li ankaŭ fizike respondis la postulojn de la eksperimentado?
- Sendube jes, ĉar krom Nobel-premiito li ankaŭ estis universitata dekatlon-ĉampiono.
- Kaj ŝi?
- Tri respondoj alvenis post kvar monatoj. La laboratorio devis elekti laŭ la diversaj kriterioj. Neniu el la respondintaj virinoj estis vere blonda. Pro tio la elekto-komisiono decidis rezigni pri tiu postulo. Laŭ la ceteraj kriterioj venkis iu doktorino pri lingvistiko, 28-jara, kiu tiam laboris en Patagonio kaj kies nomo estis Gerda Peris.
- Patagonio? Kion ŝi faris tie?
- Ŝi pristudis iun etnan lingvon, kies strukturoj multe similas tiujn de Esperanto.
- Stranga ideo por patriniĝi. Ĉu ŝi ne povis trovi pli naturan rimedon surloke?

- Ne ŝercu! Logis la ideo fariĝi patrino de superhomo en plena libereco.
- Iom strange!
- Ekzameno farita de specialistoj komisiitaj de la laboratorio en Punte Arenas montris ŝin perfekte sana kaj nasko-kapabla. Oni elprenis ovolon ĉar ŝi estis en favora periodo. Avertite fakte la laboratorio tuj sendis la semon de Paul Igloto per speciala ĵet-aviadilo de T.V.T-kompanio (Tutvaro Transportoj), al Madejra Insulo, kie, en Funchal, jam atendis la ovolo de Gerda Peris. Dank'al la kompetenteco de la specialistoj tien senditaj la fekundigo bone okazis.
- Kaj pri la sekvo?
- Du semajnoj poste Gerda venis al Funchal kaj la ovolo estis enuterigita.
- Ĉu la eksperimento sukcesis?
- Jes, sed....

- Okaze de la unua ekografio konstat-ebilis, ke batas ne unu, sed du koretoj. Sekve al grava diskuto la sciencistoj decidis, ke...pli bone estas atendi kaj observi la sekvon. Tion ili faris ĝis la nasko. Tiam, surprizo! du fratinoj kaj ambaŭ estas duon-nigraj. Mistero pri kiu la sciencistoj enketis ĉe la patra kaj la patrina familioj. Rezulto nekonata: profesia diskreteco! ...La laboratorio prizorgis la bebojn dum kelkaj monatoj ĝis... la malapero de la patrino kun unu el la filinoj: Mala. Eka restis en la kliniko, kiel kobajo.

- Tiel parolis du amikoj antaŭ 25 jaroj. Kiel ili povintus suspekti, ke, 25 jarojn poste.....
- ...En la urbo Punta Arenas, ĉe ĉiu vojkruciĝo deĵoras policistinoj. En la stacidomo blovas en la fajfilo virino en uniformo. Ĉe sia skribotablo subskribas dokumentojn la urbestro, helpata de virinaj taĉmentoj. La viroj sklavine laboras en infan-bredejoj, hoteloj, lavejoj... ne multe en Universitatoj. Ĉe la terasoj de la trinkejoj virinoj enuante pasigas la tempon. Tiel en la tuta kontinento.

TIE REGAS LA SUPERHOMAJ MALA PERIS KAJ EKA PERIS!

Konfeso de la Mortiginto

Rakonto de D-ro T. JANKOV

Ĉiun jaron, mi pasigadis 1-2 monatojn ĉe la maraj banlokoj. Tie mi kutimis ĉirkaŭiradi vespere la plej izolitajn bordojn de la maro, kiu nehaltigeble min allogis. Mi, kun plena kontenteco, piedĉifis la sablon varmigitan de la suno, mi eĉ alproksimiĝis al la maro, kies ondoj kviete kaj delikate tuŝadis miajn piedojn. Mi aŭskultadis kun raveco ĝian unuforman kantadon; forlogita, mi ameme rigardadis ĝian senfinan spacon, kiu perdiĝas, malaperas antaŭ mia rigardo. Ifoje aperis la blanka velo de iu ŝipeto, kiu ŝajnis al mi esti la flugilo de iu grandega birdo.

Tiel ĉiutage mi pasigadis la vesperiĝon sola, kaj neniam mi kredis renkonti iun en tiuj izolitaj lokoj. Sed iun vesperon mi estis surprizita trovante maljunetan viron. Li sidis malgaja kaj enpenŝiĝinta. Mi lin salutis; li respondis al mia saluto, mirige rigardante min. "Ankaŭ vi estas amanto de la maraj izolitaj bordoj?" diris mi, levinte mian ĉapelon kaj dirinte mian nomon. "Jes, tio estas, mi estas propre amanto de preskaŭ nenio..." respondis la sinjoro kviete, ne dirante sian nomon, el kio mi konkludis, ke li ne volas interkonatiĝi.

Ioman momenton mi hezitis kaj rigardis la malgajan vizaĝon de la viro, sur kiu la vivo kaj la ĉagreno estis lasintaj postsignojn, kelkajn profundajn sulkojn. Mi pensis, ke mi devas lin lasi, sed tuj kiam mi volis ekiri, li ekrigardis min kaj, leviĝante, diris kun malestima rideto: "Ĉiam tiel! La sama kanto!". "Kiel? kiu kanto?" mi demandis ŝajnigante miron.

"Kiu kanto! La kanto de la maro. De mateno ĝis vespero, kaj de vespero ĝis mateno, ĉiam la sama murmurado, kvieta kaj indiferenta. Sed la maro de la vivo ne estas tiela.; ĝi estas plena de ĝojoj kaj malĝojoj, dolĉecoj kaj maldolĉecoj, amo kaj malamo...Ha, ha!

"Tiel estas" mi respondis; mi ekĝojis, ke li komencis paroli.

Tiu nekonata viro forte interesis min kaj mi decidis, amikiĝi kun li. Li ekiris. Ankaŭ mi ekiris. Ni ekinterparolis. Ni fariĝis amikojn. Ni ofte renkontiĝis ĉe la izolitaj apudbordaj ĉirkaŭaĵoj kaj interparoladis amike. Iun vesperon, mi rimarkis, ke mia nekonata amiko estas multe pli ĉagrena ol ordinare, kio igis min demandi pri la kaŭzo de tio. Unue li respondis nenion. Pensinte iom, li ekparolis mallaŭte: "Diri al vi la kaŭzon, signifas, ke mi rakontu al vi mian teruran pekon, kiun mi elpagis antaŭ 2-3 jaroj en la malliberejo, signifas diri al vi, ke mi estas mortiginto, kaj fortimigi vin de mi, post kiam mi igos vin naŭziĝi je mi".

Mi frostotremis. Mallongan momenton al mi ŝajnis, ke mi rilatas kun freneziĝinta homo, sed kiam li ekrigardis min serioze, mi kuraĝiĝis. "Ne, ne, neniam mi naŭziĝos je vi... kiel!...kial!...mi, naŭziĝi?" mi murmuris interrompe.

"Tio estas, vi vidos, historio el la pasinteco de mia vivo,...estas mia tuta vivo. Mi ne rifuzos ĝin rakonti al vi, ĉar, kiam mi ĝin ripetas, mi sentas, ke mi revenas en la pasintecon kaj vivas, suferas kaj ĝuas.

Ĉe tio li rigardis en la malproksimecon de la mara spaco, poste, spirinte, li komencis: "Tio estis ĝuste antaŭ 23 jaroj. Mi estis 25-jara, kaj estis okupata kiel oficisto en la agentejo de la anglaj vapor-ŝipoj en ĉi-tiu urbo. Mia salajro kaj profito de mia privata bieno donis al mi la eblecon vivi tre bone; tiel, ke mi ne seniĝis je amuzoj; mi vizitadis la ĝardenojn,, la kunvenejoj, la klubojn, la koncertojn, kaj precipe la balojn. Tiel, dum unu bonfaranta balo mi konatiĝis kun iu fraŭlino. Tiu ĉi estis 18-19-jara knabino kun ĉarmega eksteraĵo kaj bonaj kondutmanieroj. Ŝi ŝajnis esti en la komitato kiu organizis la balon, ĉar kune kun la aliaj sinjorinoj ŝi akceptadis la oferaĵojn, kontraŭ kiuj ili donadis po unu viva (natura) rozo. Mi alproksimiĝis, kiel la aliaj, apud la tablo, kie staris tiu bela knabino, mi enlasis mian helpon en la vazon kaj, kiam mi intencis

forpaŝi, ŝi haltigis min kaj donis al mi unu pale-ruĝan rozon; sed kiam mi ĝin akceptis, pikaĵo enpikiĝis en mian fingron, kaj mi nevole ellasis: "oh!".

"Ho mi bedaŭras tre multe, sinjoro, ke mia rozo vin pikis" ekparolis ŝi kompateme.

"Ha, mi petas, tio estas malgrava afero", mi ekbabilis aŭtomate, kaj kaŝe forviŝis la malgrandan guton da sango, kiu montriĝis sur la pikita loko." Sed pro la kaŭzitaĵo mi vin deziras por la unua kvadrildanco, se vi estas libera", mi diris gaje, klininte mian kapon kaj min mem rekomendinte.

"Kun plezuro, sinjoro", respondis ŝi.

Tie mia amiko ĝemis kaj enpenŝiĝis. Mi, kun scivolemo, atendis la pluon de la rakonto.

"Kaj tiel, kiel klarigadi al vi la superflujajn detalaĵojn, mi nur diros al vi, mi fariĝis proksima, en tre proksimaj interrilatoj kun la knabino, kaj ni renkontiĝadis poste sufiĉe ofte en la domo de ŝiaj gepatroj, kiuj estis estimataj, sed ne riĉaj personoj. En tiuj oftaj renkontiĝoj mi nerimarkeble, sensaĝe, enamiĝis al ŝi, kaj mia amo des pli fortiĝis, kiam mi certiĝis, ke ŝi min amis pli multe ol mi supozis. Mi estis feliĉa, senfine feliĉa. Iun tagon mi diris al ŝi, ke por mallonga tempo mi devas forlasi la urbon. Ŝi paliĝis kaj ne povis deteni siajn larmojn. Tio ĉi servis, por ke ni povu pli bone interkompreniĝi, ĉar fariĝis evidente, ke ŝi min amas. Mi trankviligis ŝin, forviŝis ŝiajn larmojn, kisis ŝian blondan hararon. Ĉe la ekiro mi donis al ŝi mian portreton.

Tie ĉi li ree enpenŝiĝis, kaj kvazaŭ enaŭskultiĝadis en la bruadon de la maro aŭ volis ion rememori.

"Ne pasis tro multe da tempo", li daŭrigis; "mi revenis, ekpetis ŝian manon; ni faris la geedziĝ-ceremonion kaj ni komencis vivi feliĉan familian vivon. Sed ne estis decidite, ke mia feliĉo daŭros

longan tempon. Kelkajn monatojn post la geedziĝo, mi rimarkis, ke mia edzino jen nun, jen poste, min rigardetis suspekta, ne respondis al miaj flatoj, sulkigadis la frunton, paliĝadis kaj plej poste enkuris sian ĉambron, en kiu ŝi sin enŝlosis. Mi toleris kaj suferis, ofte mi aliris surpiedfingre apud la pordo, enrigardis tra la ŝlosiltruo, kaj mi ŝin vidis ploranta aŭ pensanta kun kapo klinita.

Tiam mi ŝin petadis eliri, mi parolis tutajn horojn, mi suferis, mi ploris...Nenia respondo! Eĉ ne per unu vorteto ŝi respondis al mi..."Mi ŝin perdis", tiam ekkriis mi en malespero; "ŝi aŭ neniam estas amiĝinta al mi, aŭ jam estas ekamiĝinta al alia!" lafoje mi komencis kribi, riproĉi, sed ankaŭ tio ne helpis. Mi sentadis, kiel miaj fortoj forlasas min; mi sentadis, kiel ĉio fariĝadas al mi kontraŭa, kaj kiel mia loĝejo aliformiĝadis en tombejon..."

Tie ĉi li haltis, ekspiris kaj rekomencis.

"Iam mi vidis ŝin eligi ion el sia ĉebrusta poŝo, por ĝin rigardi kaj kisi, kaj plori; tiam mi konvinkiĝis definitive, ke ŝi estas forlogita, perdita...Droniĝinta en ĉagreno, mi ne iris al laboro, mi eniris en mian ĉambron kaj kuŝis tutajn horojn malspritiĝinta....Sed jen la pordo de ŝia ĉambro malfermiĝas senbrue, kaj ŝi malrapide aliras al mi.

"Iru, iru al via laboro, mia kara", ŝi komencis ĝentile, genuflekante apud mi; "ne koleru al mi, tio estas nur kaprico, simpla kaprico!" Kaj ŝi apogadis sian flamiĝintan frunton sur mian vizaĝon, min ĉirkaŭprenis kaj flustris: "mi nun konvinkiĝis, ke vi min amas multe, tre multe, sed mi, mi ne estas inda je via pura delikata amo...mi vin turmentas!" Kaj ŝiaj larmoj ĉe tio komencis min malsekigi.

Li ekĝemis kaj ree daŭrigis: "Sed post tio, ŝi kaptis per siaj manoj mian kapon, kaj fiksante sian rigardon rekte en la pupilojn

de miaj okuloj, ŝi diris sufoke:
 "Sed vi, ĉu vi ne amas jam alian?
 Estas tiom da ĉarmaj kaj allogaj
 virinoj, kaj vi, viroj, tiel rapide
 forgesas, forlogiĝas..." Sed mi
 ŝin certigadis pri mia efektiva
 amo, kaj mi trankviligis ŝin. Tiam
 ni ree interpaciĝis, kaj post tio
 mi iris al la laboro. Sed tiuj
 ripetitaj scenoj neniel forigis
 la suspekton; mi ne ĉesis ŝin kaŝe
 persekuti. Sed mirinde! Ofte al
 mi ŝajnis ŝin vidi, ke ŝi min
 persekutas aŭ aperas ĉirkaŭ la
 konstruaĵo de la agentejo".

Tiel parolis la viro. Lia
 vizaĝo mallumiĝis, lia rigardo
 nebuliĝis kaj ŝvito ekaperis sur
 lia frunto. Mi sentis, ke mi lin
 kompatas, ke mi suferas kune kun
 li.

"Rimarku tion", li daŭrigis,
 "ke tiuj hejmaj scenoj ripetigis
 tre ofte, kaj precipe kiam mi revenis
 pli malfrue ol kutime.

Iun vesperon mi revenis malfrue
 kaj trankvile mi aliris apud la
 pordo de ŝia ĉambro, kiu estis
 iomete malfermita. Mi enrigardis.
 Mia edzino sidis kun mano apogita
 sur la tablo, kaj elplorinta, ŝi
 rigardis tiun "ion", kiun ŝi tiel
 zorge kaŝadis de mi. Mi eksentis,
 kiel dolore enfermiĝas mia koro;
 mi koleriĝis kaj eniris en la ĉambron.
 Ŝi konsterniĝis, kaŝis la "ion"
 en sian ĉebrustan poŝon kaj sulkigis
 siajn brovojn nekontenta... Mi
 antaŭvidis, ke estas okazonta
 tiun nokton, io terura. Torento
 da kolero, elreviĝo kaj malkontenteco
 plenigis mian bruston, sufokigante
 min.

"Donu tion, kion vi nun kaŝas!"
 mi ekkriis ordone. Ŝi silentis.

"Ĉu vi aŭskultis, kion mi diris?"
 ekkriegis mi. Ŝi ree silentis.

"Ci ne estas homo, ci estas
 monstro, ci estas serpentino, kiu
 estas ĉirkaŭvolvinta per vi mem
 mian korpon kaj suĉas mian sangon,
 mian sanon... Kanajlo! Ci estas
 elirinta el la infero por min turmenti
 kaj mortigi," kriis mi furioziĝinta.

Sed ŝi silentis kaj ne moviĝis.

Plej poste lacigita, venenita,
 mi sidiĝis sur iun seĝon kaj ŝin
 rigardis kaj demandis al mi mem:

"Kial tiel sensaĝe mi amas tiun
 estaĵon, kiu tiel senkompatate min tur-
 mentas? Ĉu ne estas eble min savi
 el ŝiaj ungoj?"—"Ne, ne, kaj ree
 ne", respondadis al mi ia interna
 voĉo. Mia vivo, mia animo, mia
 tuta posedaĵo estis fardonitaj al
 ŝi, kaj nur al ŝi. Mi ne sciis,
 kion entrepreni. La penso, ke ŝi
 eble amas alian, min enigis en
 duonkonfuzan situacion...

En tiu momento ŝi indiferente
 eltiris ree la abomenan por mi
 "ion", kaj komencis ĝin rigardi
 ameme. "Kio povas esti tio?", mi
 demandis min; "letero? Portreto?
 kio?" Antaŭ miaj okuloj ĉio mallumiĝis,
 en miaj oreloj io bruas, kaj mi,
 saltinte, ekkriegis: "Mi ordonas
 al vi, tuj doni tiun aĵon, kiu
 vin forlogas, aŭ mi vin mortigos!"

Ĉe tio ĉi, mi salte prenis
 la revolveron, kiu pendis ĉe la
 muro apud mi. Ŝi ne moviĝis. Tiam
 miaj pensoj implikiĝis, antaŭ miaj
 okuloj ree mallumiĝis, mia mano
 etendiĝis, la ĉano momente falis,
 kaj la tondro disportiĝis!

Malforta ekkrio, sekvita de
 surda falo igis min rekonsciiĝi. Mi al-
 kuris al la loko, kie sidis mia
 edzino; ŝi kuŝis sur la planko;
 el malgranda truo ĉe ŝia brusto
 fluis maldika strio da sango...
 Mi ekkriis pro teruro kaj kompatato,
 mi ĵetis min sur la korpon kaj
 ekploris laŭte. En tiu momento
 mi rimarkis la fatalan "ion" en
 ŝia mano: estis mia portreto, kiun
 mi estis doninta al ŝi ĉe mia ekforiro
 antaŭ nia geedziĝo. La malespero
 plenigis mian animon. Mi min klinis
 por ŝin kisi, sed renkontis ŝian
 frostiĝintan rigardon. Mi intencis
 min memmortigi. Sed mi volis suferi
 kaj alkuris al la arestejo. Kaj
 tiel mi elpagis mian pekon per
 20-jara mallibereja aresto. Mi
 ĝin elpagis antaŭ la publiko kaj
 leĝoj sed antaŭ mia konscienco, ne!"

Post tiu vespero mi ne plu
 vidis tiun malfeliĉan viron.

El bulgara lingvo tradukis

N. ĀRISTOSKOFF

POR VIA DISTRO

Ĉu la skrablo-problemo proponita en la antaŭa "Por via Distro" plaĉis al vi? Ĉu vi ŝatus, ke ni proponu pliajn tiajn al vi? En la revuo ni povas tion fari nur po unu fojon ĉiujare, ĉar ne ĉiuj legantoj interesiĝas pri tia distraĵo. Sed....

Propono: ni povas sendi al la skrablo-ŝatantoj broŝureton kun 20 diversaj problemoj preparitaj de Juanita Turbillon por nur 18 frankoj; la sendo-kosto estas entenata.

Sendu vian mendon kaj ĉekon al:

KULTURAJ KAJEROJ

17, rue Romain Rolland

F-85100 Le Château d'Olonne

LITERSUPO

a	r	t	r	i	ŝ	e	o	k	s
o	c	e	l	t	e	i	r	i	o
a	f	a	p	z	e	u	o	l	o
k	a	r	d	o	l	t	o	e	k
u	k	o	n	u	m	o	m	e	l
o	o	n	g	e	e	s	n	o	p
o	t	r	e	o	s	a	s	k	o
r	d	z	o	n	a	e	r	o	ŝ
p	n	i	n	a	ĝ	e	c	o	z
e	n	o	r	p	r	e	a	z	o

Ĉi tiu-specan enigmon oni trovas ofte, ekzemple en hispanaj periodaĵoj. En nian hodiaŭan cent-literan "supon" ni metis, dispecigitajn, dek diversajn legomojn, inter kies elementoj aperas, ankaŭ dise, kiel "buljono", frazo eltirita el la ekzercaro de la "Fundamento de Esperanto". Ni precizigas, ke por la unua fojo kaj por enigmo de la unua grado, ni konservis la normalan ordon de la elementoj kaj ni eĉ aranĝis laŭalfabete la liston de legomoj, kvankam tiuj reguloj ne estas nepra postulo. En via solvo aperu do: 1- la dek legomoj; 2- la kvinvorta "buljona" frazo. La solvo aperos en la venonta numero de la revuo.

LA VIVO EN GRESILLON

Komitatkunveno - Dimanĉon la 25-an de oktobro 1992

Ĉeestas la kunvenon: D. kaj P. Babin, S. Bourot, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, Ph. Combote, G. Dairon, P. Gemin, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Métivier, P. Naulet, J. Vincent. La aliaj komitatanoj senkulpiĝis.

Staĝoj 1992 - La nombro da staĝanoj iomete malkreskis kompare al la antaŭa jaro: 239 ĉeestantoj en 1992 (265 en 1991), 2220 tranoktadoj en 1992 (3102 en 1991). La ĉeesto-daŭro de la staĝanoj pli kaj pli mallongiĝas. Sed ĝojige estas la fakto, ke pli da ĉeestantoj 30/40 jaraĝaj vizitis la kastelon ĉi jare. La nombro da eksterlandaj aliĝintoj iom kreskis: meza nombro: unu triono de la tuta ĉeestantaro. La kursoj estis kontentige ĉeestataj sed ne la prelegoj, eble pro ne taŭgaj horoj.

La partoprenantoj multe interesiĝis pri la artlaboroj. Laŭ la ebloj, pliaj tiaj laboroj estos enkondukitaj en la venontjaraj programoj: libro-bindado, korbifarado, fotoarto, emajlado.... Eventualaj bonvolemaj gvidantoj bonvolos sin proponi.

Staĝoj 1993 - La printempa staĝo okazos de la 24-a de aprilo ĝis la 1-a de majo. Ne estis eble trovi periodon taŭgan por la libertempaj tri zonoj. Kursoj estos organizitaj laŭ la niveloj (verŝajne du) de la infanoj. Estas antaŭvidita la partopreno de eksterlandaj geknaboj ĉefe el Hungario. La Esperanto-Domo ne povas finance helpi ĉiujn. La speciala Fonduso Infanrenkonto daŭre akceptas mondonacojn. La nombro da partoprenantoj eksterlandaj geknaboj dependos de la kolektita sumo.

La someraj staĝoj komenciĝos la 23-an de junio kaj finiĝos la 1-an de septembro. Administros: P. kaj L. Babin, D. kaj J. Moirand, R. Lenel kaj R. Lloancy, P. Babin kaj Ph. Combote, D. kaj N. Babin. Krom la kutimaj kursoj okazos teatra staĝo de la 23-a de junio ĝis la 8-a de julio. Eva Bondard gvidos Cseh-seminarion de la 8-a de julio ĝis la 21-a, kaj seminario "B" de la 22-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Kimie Markarian instruos la uzadon de la japana abako kaj regami. De la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto Fernand Boyet gvidos kurson pri gramatiko kaj de la 13-a ĝis la 18-a Georges Lagrange kurso pri tradukado. Dum la lasta periodo (19/08 - 1/09) oni parolos pri pedagogio.

Prizorgaj laboroj Kiel antaŭvidite la apudkuireja lavejo estos renovigita. Modernigo de kursoĉambroj estos daŭrigata: sonizolada kaj meblaro. La prezidanto akordiĝis kun najbaro pri la purigado de la arbaro.

La prezidanto fermas la kunsidon je la 17-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON

ĈU VI PETIS LA PROGRAMON DE 1993? NE PLU ATENDU!

LIBRO-SERVO

OFERTO PRI AŬKCIO

Bonvolu sendi viajn prezproponojn en la limo de UNU MONATO post la apero de ĉi tiu oferto al: S-ino J. VINCENT, 26 bis rue de Milngavie F-49150 BAUGE.

(N = kvazaŭ nova - U = uzita)

<u>Titolo</u>	<u>Baza prezo</u>	<u>Stato</u>
Fundamento de E ^o , Esp. Centra Librejo 1931	20 ff	N
La interrompita kanto „ 1928	20 ff	N
Kampomuso ekskursas Esp. Franca Eldonejo	10 ff	N
La ratkaptisto el Hameleno „	10 ff	N
Kun niaj amikoj, la bestoj „	10 ff	N
Eta plumba soldato „	10 ff	N
Orharulko kaj Ruĝakresto „	10 ff	N
Peer Gynt (Ibsen), Eld. Rondo, Trondheim, 1951	50 ff	N
E ^o , fil d'Ariane (Delaire), dulingva 1959	30 ff	N
„ kun subskribo de l'aŭtoro	40 ff	N
La dolĉa Franclando (Delaire) 1972	30 ff	N
Marta (Orzesko), eld. Hachette, Bindita 1910	50 ff	U
Plena Vortaro, 3-a eldono 1947	50 ff	U
Suplemento al P.V. 1954	10 ff	U

(La libroj estos senditaj aŭ frankite)

NOVAĴOJ AKIREBLAJ EN LA LIBRO-SERVO

<u>Por instruado:</u> de A. Pettyn Ĉu vi parolas esperante?	50 ff
Esp ^o , en epizodoj	55 ff
(Ĉi lastan akompanas du kasedoj)	120 ff
de S. Mac Gill Tendaraj tagoj, kajero 1	37 ff
Tendaraj tagoj, kajero 2	46 ff
<u>Por memklerigado:</u> Fundamenta Krestomatio, glosoj de Waringhien	150 ff
Nova Esperanta Krestomatio (W. Auld)	175 ff
<u>Por distrado:</u> Aerlumo, de Fonseca, kasedo kun kantoj	85 ff
Angoroj, de J.L. Mahé - vidbendo	180 ff

Mendu de S-ino J. Vincent 26 bis rue de Milngavie, 49150 BAUGE

NE PAGU tuj - Bonvolu atendi la fakturon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Nia lingvo uzas diversajn vort-elementojn, enskribitajn en la Universala Vortaro.

Ili estas RADIKOJ, AFIKSOJ (prefiksoj kaj sufiksoj) kaj FINAĴOJ (O.A.E.I.).

RADIKOJ

Substantivaj (kun O-finaĵo)
homo, kato, tablo, indigno.

Adjektivaj (kun A-finaĵo)
blanka, akra, rekta, ĝoja

Verbaj (kun I-finaĵo)
pensi, rigardi, sonĝi, perturbi


Kaj alispecaj
adverboj (tial, spite) **prepozicioj** (dum, antaŭ)
konjunkcioj (kaj, se) **interjekcioj** (bis, nu).



Ĉu gigantismo ?

— Sinjoro ! Antaŭ du monatoj vi vendis al mi kanarion.

Ĉu vi ne eraris ?



Inspiro-paneo

— Mia kara, estu trankvila ; mia lasta verkaĵo estos baldaŭ preta. Sed, de kelkaj tagoj, mia muzo strikas.



Plentage-kaj-nokte roli :

— Revi, enamiĝi, edziniĝi, amori, gravediĝi, naski, varti, nutri, vesti, karesi, konsoli, flegi, lavi, gladi, fliki, aŭdi, silenti, ripari, maldormi, frue ellitiĝi, malfrue enlitiĝi... Jen la edzina rolo !

— Kara mia, mi ne volas senigi vin je tiom da riĉaĵoj !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).
- Germanujo Okc.** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiōziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Jugoslavio** : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol.).
- Pollando** : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugalio** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboã.
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponeto al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34